



Jarkolekto : 2013

Numero : 1

Paĝo : 1

La Voĉo de Amikejo

Informilo pri **Senlime** kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

SenlimeEsperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.org

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands**Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.org

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.org

K. Hogen, Auf der Pief 22

DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro kaj**rete elŝuteblas ĉe****www.senlime.org****Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere antaŭ la
jarfino, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La abono al la papera versio de nia
informilo (12 €) **NE** enhavas la
kotizon al **Senlime** (10 €).**ENHAVO :****p. 1 : Nova jaro kaj kotizoj****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (2/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : Muziko kaj Esperanto****p. 6 : Verviersa angulo**La komitato de **Senlime** (kaj esperantista grupo de Verviers) plezure
deziras al vi ĉion plej bonan dum la jaro 2013...Ni esperas, ke nia informilo «**La Voĉo de Amikejo**» tute trankvile kaj
regule plu aperos kaj plaĉos al vi, same kiel niaj aliaj agadoj
(prelegoj, film-surtekstoj, karaokeoj, festoj, k.t.p.).Ni rememorigas al vi ke nia informilo estas libere elŝutebla (kaj
reproduktebla) el nia retejo je la jena adreso :<http://www.senlime.org/Info/Lasta.zip>Dank'al tio, ĉiu rajtas libere (re)presi (sen ŝanĝoj) nian informilon.
Kompreneble **Senlime** ne responsas pri la laboro de eventualaj
revendistoj (kiel ekzemple «Esperanto en Marche» por Belgio).La interesiĝantoj en Eŭregiono Mozo-Rejno ankaŭ povas aboni al
papera jarkolekto ĉe Henri Lentzen. La jarkolekto kostas 12 Eŭrojn
nepre pagendaj al la konto BE41 9795 3271 4810 de **Senlime**, 25
rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.Estas notinde, ke la abono al «**La Voĉo de Amikejo**» (aŭ
«Esperanto en Marche») **NE** enhavas kotizon al **Senlime** kaj ke
laŭstatute, estas membro de **Senlime** nur tiu, kiu pagas la jaran
kotizon (fiksitan je 10 EUR). Pagante nur 12 EUR al nia konto, vi iĝas
abonanto (kaj supozita «*simpatianto*»), sed por esti membro kaj **vere**
subteni niajn agadojn, necesas ankaŭ pagi la 10 EŭR da kotizo (la
abono al la informilo kovras nur la kostojn de tiu-ĉi : papero k.t.p.).

Koran dankon por via komprenemo, simpatio kaj/aŭ (re)membriĝo !




Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Esperanto 125-jara

Trankvile kaj diskrete, la esperantista mondo festis, la 26-an de julio 2012, la 125-an datrevenon de la naskiĝo de esperanto, tio estas fakte de la «**Unua Libro**» de Zamenhof, enhavanta la unuan prezenton de la lingvo kaj bazan vortprovizon.

Pro malfrua apero de la franca filmo «Esperanto» de Dominique **Gautier**, **Senlime** kaj la esperantista grupo de Verviers ne povis okazigi la publikajn projekciadojn antaŭviditajn en Verviers kaj Kelmis, sed ja okazis la speciala **Trilanda Renkontiĝo** en Verviers, la 28-an de oktobro, kun gisado de sonorilo okaze de la 75a datreveno de la kariljono de la preĝejo «Nia-Damo» en Verviers (kun urba vizito, komuna tagmanĝo kaj kariljon-koncerto).



La ĵus naskiĝinta sonorilo

Ankaŭ ĵus okazis nia **Zamenhof-festo** en Verviers, la 16an de decembro, kun bankedo kaj kristnaska koncerto en la preĝejo «Nia-Damo».

Konversaciaj tabloj

Duafoje, dum la «vintra paŭzo», **Senlime** proponas al siaj membroj konversaci-tablojn. Tiel ili havos plian rimedon (krom libroj, filmoj, reto, k.t.p.) por konservi kontaktojn kun la lingvo esperanto kaj eĉ plibonigi sian lingvo-nivelon.

Ankaŭ somere ni proponas tion, kune kun promenada programo (laŭ la vetero) por pli bone konatigi al ili la trilandiman regionon de Kelmis (Amikejo).

Tiaj konversaci-tabloj jam de pluraj jaroj funkcias per plej diversaj lingvoj, interalie en Vervierso (ili ricevis la Eŭropan markon pri lingvoj en 2002).

Ili arigas prefere +/- 7 aŭ 8 personojn kun baza kono de la celita lingvo kaj animanto (kun – pli - bona lingva nivelo), kiu proponas temojn kaj uzas fakajn teknikojn kaj materialon. Ofte li aŭ ŝi apogas sin sur la vivspertoj kaj sentoj de la partoprenantoj.

La okazigo aŭ ne de tiuj tabloj en Kelmis dependos de la sinpropononta animanto, kiu bonvolu antaŭe kontakti nin. Esperantistoj certe ne risku sian sanon (monon) kaj vivon sur danĝeraj vojoj, do ĉeesto de multaj membroj dependos de la anoncita vetero !

01-18 kaj 02-15
20h00 BE-Kelmis, Select:
"Konversacia tablo".

Kontakt. J.M. Jacques
jacques@senlime.org

La Irlanda fluto

Irlanda fluto estas, en la angla, ĝenerala vorto por priskribi tri muzikilojn similajn al fluto, uzitajn por iama irlanda muziko :

- la "**Irish flute**" (irlanda fluto), trarekta fluto el ligno aŭ plasto.
- la "**tin whistle**" (stana fajfilo), rekta fluteto el metalo aŭ ligno, kun ses truoj.

- la "**low whistle**" (malforta fajfilo), fluto pli granda el metalo, plasto aŭ ligno, kun ses truoj.

Oni retrovas tiujn tri flutojn ankaŭ en la bretona muziko nuntempa, interalie ĉe muzik-grupoj por "fest noz" (**Sonerien Du**, **Gwendal...**) sed ankaŭ ĉe rok-grupoj kiel **Merzhin** aŭ **Matmatah**.

Alan Stivell kiel unua popularigis tiujn muzikilojn, precipe la "tin whistle", en Francio (album **Live à Dublin** 1978).

La "low whistle" sonoras multe pli silenteme ol la "tin whistle". Ĝi uzatas en pli malrapidaj melodioj.

"**Fest-noz**" signifas "festo nokta", dum "deiz-fest" estas "taga festo". Temas pri "revivalist"-a, festo inventita en la 1950-aj jaroj centre de Malsupra Bretonio por rekrei la gajajn kamparanajn festojn, kiuj malaperis en la 1930-aj jaroj.

Ĉiu el ni konas la eruditecon kaj la (duon-)kaŝitan gajecon de nia historiisto, Mathieu Schrymecker, kiu ankaŭ jam montris muzikajn talentojn: nemaltrafinda vespero !

03-15 20h00 BE-Kelmis, Select:
"Prezento de la Irlanda fluto" far'
Mathieu **Schrymecker**.
Inf. jacques@senlime.org

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (1/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Luticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

01-18 20h00 BE-Kelmis,
Select: konversacia tablo.
Inf. jacques@senlime.org

02-15 20h00 BE-Kelmis,
Select: konversacia tablo.
Inf. jacques@senlime.org

03-15 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Prezento de la
Irlanda fluto" far' Mathieu
Schrymecker.
Inf. jacques@senlime.org

04-19 20h00 BE-Kelmis,
Select: "La simboloj de la
Verviersa justic-palaco".
Prelego de José **Jacob**.
Inf. jacques@senlime.org

05-17 20h00 BE-Kelmis,
Select: "La franca, stulta
lingvo", prelego de Didier
Lousberg.
Inf. lousberg@senlime.org

06-21 20h00 BE-Kelmis,
Select: Karaoke en esperanto
Inf. jacques@senlime.org



FESTO 2013 ("Festa Esperanto-Semajno Terure Organizita") okazos en Kelmis, de la 11-a ĝis 18-a de Aŭgusto. Temas pri muzika festivalo kies programo estas organizita de EUROKKA. Multaj junuloj partoprenos kaj ĝojos tie renkonti vin (eĉ se vi tute ne konas esperanton... sed ŝatas la nunajn muzikojn).

18-01 20h00 BE-Kelmis,
Select: table de conversation.
Inf. jacques@senlime.org

15-02 20h00 BE-Kelmis,
Select: table de conversation.
Inf. jacques@senlime.org

15-03 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Présentation de la
flûte irlandaise" par Mathieu
Schrymecker.
Inf. jacques@senlime.org

19-04 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Les symboles du
palais de justice de Verviers".
Conférence de José **Jacob**.
Inf. jacques@senlime.org

17-05 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Français, langue
idiote", conférence de Didier
Lousberg.
Inf. lousberg@senlime.org

21-06 20h00 BE-Kelmis,
Select: karaoké en espéranto.
Inf. jacques@senlime.org



Une **FESTO 2013** aura lieu à La Calamine, du 11 au 18 aout. C'est un festival musical dont le programme est organisé en collaboration avec l'association de musique rock EUROKKA. Beaucoup de jeunes participeront et seront heureux de vous y rencontrer (même si vous ne parlez pas l'espéranto... mais aimez les musiques actuelles).

Novaĵoj pri **KELMIS-AMIKEJO** .

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

Ludoviko urbestros en Kelmis

Ĉu nova urbestro por Kelmis? La demando (ege interesa por ni, esperantistoj, kiuj sonĝis pri esperantista urbestro kiel en Herzberg... dum ve eĉ ne unu esperantisto kandidatigis) monopolis en la gazetoj dum la lastaj semajnoj, pro la urbaj balotadoj de la 14-a de oktoro.

La listo PFF-MR (Partio por Libereco kaj Progreso - Movado Reformema) de Ludwig Goebbels (+6 sidiloj ĉe la urba konsilantaro) venkis kun 38,19% antaŭ la CSP-CDH de la iama urbestro Mathieu Grosch, kiu estas la granda perdinto de tiu balotado, kun 5 sidilojn malpli. Li ne plu havas sian absolutan plimulton.

Ek de tiam, la listo PFF-MR estris la ludon en Kelmis. Alianco CSP-SP antaŭvidita antaŭ la balotado matematike ne plu eblis. La SP (socialistoj), kun 16,77%, havigis al si 3 sidilojn kaj Ekolo konservis siajn 2 sidilojn.

La nova urbestro do estas Ludwig [Ludoviko !] **Goebbels**. Tiu Ludoviko naskiĝis la 15an de januaro 1952, estas edziĝinta kaj emeritiĝinta, iĝis urba konsilanto en 2000, okupiĝis pri financoj, urba planigado, voj-konstruado kaj turismo. Liaj ŝatokupoj estas muziko (precipe **rok-muziko**), komponista metio, **karnavalo** (kiel decas !) kaj Kelmisa historio. Ni do rajtas esperi, ke li ankaŭ interŝiĝos pri esperanto kaj Amikejo! Li ne studis lingvistikon sed estas diplomita pri aŭtomobila mekaniko.

Ni kompreneble baldaŭ renkontu lin...



Ludwig GOEBBELS

Ĉu MALamikejo ?

Tri personoj, inter 21 kaj 27 jaroj aĝaj, estas arestitaj sekve de batalo per tranĉilo kaj hakilo, mardon la 23an de oktobro, en la centro de Kelmis, indikis la reĝa prokurorino en Eupen, Andréa Tilgenkamp.

«La precizaj cirkonstancoj de la faktoj jam ne estas konataj, sed ŝajnas ke la viktimo, kvardekjara viro, estis vizitinta amikon kiu loĝas en Kelmis kiam li estis agresita de pluraj homoj en garaĝa enirvojo. Estas malfacile diri kiu frapis per hakilo aŭ tranĉilo», klarigis la prokurorino.

La sanstato de la viktimo ne plu estas maltrankviliga, plu precizigis S-ino Tilgenkamp.

Laŭ niaj informoj, feliĉe neniu el tiuj protagonistoj estas esperantisto. Tamen, tiu nekutima kaj malamika okazaĵo kaŭzis grandan emocion en la kutime trankvila urbeto, kaj eĉ ĉe la nelokaj esperantistoj, por kiuj Kelmis estu nur amikejo...

Aliaj Amikejoj

Amikejo ankaŭ estas simfonia orkestro kiu kunigas 75 junajn talentoplenajn junulojn el la Eŭregiono Moza-Rejno. Ilia entuziasmo estas vera ravo por la okuloj kaj la oreloj. Kadre de la Festival During Tefaf, en 2011, en la Teatro «aan het Vrijthof», ili surprizis la vizitantojn per Usona programo influita de jazz, kun verkoj de Gershwin, Bernstein kaj Copland. *Amikejo* estas direktita de Jussi Jaatinen.

Amikejo ankaŭ estas teatraĵo (en esperanto) de nia loka historiisto, Mathieu Schrymecker, en kiu li fidele kaj serioze rakontas tion, kio okazis kiam la franca profesoro Roy proponis al la loka d-ro Molly disvastigi esperanton en Neŭtrala Moresneto (nun Kelmis) kaj krei tie amikejon por esperantistoj.

Alia Kelmis

Amikejo ankaŭ estas trilingva drameto verkita de «W&T Bernard – esperantosudtirolo». En amuza maniero ĝi montras la problemojn de kunvivo en plurlingva urbo – nomita Kelmis - kaj proponas uzon de la internacia lingvo Esperanto, kiel pontlingvo kaj kiel ilo por interligi la etnajn grupojn.

...kaj alia *Senlime*

En la Germania esperanto-urbo Herzberg am Harz, la nova muzikgrupo *Senlime* kantas en la angla, germana, kaj same kompetente en Esperanto.

Ĝi konsistas el triopo, kun la kantistino Kerstin je la belsona jodladanta voĉo (unika trezoro por la Esperanto-movado).

Muziko kaj Esperant universalaj lingv j

Muziko estas konsiderata ofte kiel pura cellibera arto, tamen oni uzas ĝin tre ofte celspecife: ekzemple por vekigi certajn emociojn (ekzemple en reklamo, filmmuziko), por pliklarigi enhavon transdonita per alia ilo (voĉo, teksto, bildo), por terapiaj celoj (muzikoterapio), ktp. Ankaŭ la kombino kun aliaj artoj estas tre kutimaj pri muziko, ekzemple kun poezio (kanzono, opero, popmuziko, ktp.) aŭ danco (baleto). Pro tiu komunika funkcio oni nomas muzikon ankaŭ "universala lingvo".

Esperanto-muziko evoluas same kiel la lingvo. Tiel de la naskiĝo de Esperanto naskiĝis ankaŭ Esperanto-muziko per kantitaj tekstoj. La sono kaj la supleco de la sennacieca lingvo Esperanto tre taŭgas por kantado en ĉiuj muzikaj stiloj. Tradukoj kaj muzikaj adaptiĝoj de Esperantaj verkoj abundas.

Pluraj kantaroj en Esperanto aperis en la dudekaj jaroj [Kantanta Kamparo, Kantaro Esperanta kaj Kantaro Katolika] kaj supozeble ankaŭ jam multe pli frue. Prova 'Muzika Terminaro' estis eldonita de F. de Ménéil en 1908. La UEA-jarlibro de 1931 listigas 15 diskojn, inter kiuj - laŭ la Enciklopedio de Esperanto - troviĝis ankaŭ kelkaj kun "kanto, muziko de la Esperanta Himno, kaj aliaj Esperanto-kantoj, popol-kantoj, operarioj".

La 60-aj jaroj alportis la unuajn vinilajn diskojn al la Esperanto-muzikkulturo: "Jen nia mondo" de Duo Espera el Nederlando kaj "Ni kantu en Esperanto" el Usono kun la fama kanto "La Lingvo por ni".

En la 70-aj jaroj amaso da Esperanto-artistoj ekaperas eldonante ĉu sonkasedojn, ĉu vinilajn diskojn: Ramona van Dalsem el Nederlando, Alberta Casey el Usono, Veselin Damjanov, Mišo Zdravev el Bulgario, Ĵak Lepŭil', Max Roy Carrouges el Francio, Gianfranco Molle, Marĉela, Suzana, Giulio Cappa, Guido el Italio, Olivier Tzaut, Johan Valano el Svislando, Joëlle Rabu el Kanado. Kun tiuj artistoj ankaŭ aperas la unuaj diskeldonejoj: Edistudio en Italio, LF-koop en Svislando.

En la 80-aj jaroj naskiĝis la unuaj Esperanto-rokbandoj: Amplifiki, la unua internacia rokbando kun muzikistoj el Svedio, Danio kaj Francio, kiuj renkontiĝis en la junularaj aranĝoj IJK kaj IS; Persone el Stokholmo kaj Team' el Slovakio. En 1986 en Svedio naskiĝis la plej grava kultura festivalo Kultura Esperanto-Festivalo (KEF).

1987 estas la 100-jariĝo de Esperanto kaj baldaŭ, en 1988, sekvis la naskiĝo de EUROKKA, "Esperanto-rokmuzik-asocio" en Francio. En 1990 EUROKKA kreis Vinilkosmon, kiu eldonis la unuan kompilon, 4-titolan vinildisketon kun Amplifiki kaj La Rozmariaj Beboj, kies kantisto estis JoMo. Rok-Gazet' N-ro 0 kiu prezentis la aktualan Esperanto-muzikon.

Fine de 1980-aj kaj ekde 1990-aj jaroj ekaperis la unuaj kompaktdiskoj kun novaj artistoj: Kajto el Frislando, diversaj artistoj en kompiloj internaciaj de Vinilkosmo, Persone el Svedio, Tutmonda Muziko el Germanio,

Akordo el Nederlando, JoMo, Jacques Yvart el Francio, Solotronik el Hispanio kaj aliaj.

En 2000 okazis grandega kultura jaro por Esperanto-muziko kun Kultura Arta Festivalo de Esperanto en Tuluzo kaj KEF 7-a en Helsinko.

Nova generacio da muzikludantoj aperis, Esperanto-DĴoj kun jam steluloj kiaj DĴ Nobbi el Germanio, DĴ Kunar el Germanio, DĴ Njokki el Italio, DĴ Roĝer' el Brazilo. Kadre de diskotekaj noktoj dum junularaj aranĝoj en Esperanto (IJK, IS, IJF, IJS, KEF) ili faras ankaŭ Esperanto-diskotekon, disaŭdigante Esperanto-muzikojn por danci kaj karaokeadon.

Hodiaŭ Esperanto-muziko estas riĉa en kvalito, en diverseco de stiloj kaj originoj pli kaj pli internaciaj. Tiel ĉiuj gustoj povas trovi sian plezuron en kanzono, varieteo, roko, folko, popolmuziko, ĥoroj, lirika muziko, subgrundaj muzikoj (ekz. punko, hardkoro, traŝo) hiphopo (ekz. repo, arenbio), elektronika muziko (ekz. tekno, trenco, denco, drumenbaso, triphopo) kaj mondmuziko.

Ekzistis ankaŭ 24-hora retradio, Radio Esperanto, kie eblis legi la kantojn kaj eĉ aĉeti ilin dum la aŭskultado. Ekzemple en la reta katalogo de Vinilkosmo troviĝas sesdeko da referencoj diverstilaj sur KD kaj deko sur kasedoj.

Artikolo el "Vikipedio", la libera ret-enciklopedio en esperanto, baze verkita de Floréal Martorell (Vinilkosmo).

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**speranto **G**rupa

Un passeur de cocaïne relaxé, faute d'interprète... *et alors ?*

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)
Jean-Pol Sparenberg
20 Ruelle de Thuin
6540 LOBBES
Tél. 071/59.15.42

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
chaque année leur(s) cotisation(s),
pour Senlime, APE, UEA, au compte
979-5327148-10

IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information peut être
intégré à la revue de APE
«Espéranto en marche», qui publie
les montants des abonnements et
cotisations à APE et/ou UEA.*

*La cotisation pour **Senlime** reste
fixée à **10 Euros**.*

**Indiquez les nom, prénoms et
domicile du membre cotisant ainsi
que l'association bénéficiaire:
«cotisation de.... pour....».**

D'avance, merci à tous !

Un Brésilien qui avait été
interpellé un vendredi soir à
l'aéroport de Bruxelles en
possession de 4 kg de cocaïne
dissimulés dans sa valise, a été
relaxé le samedi par le juge
d'instruction. L'homme, âgé de
25 ans, a comparu dans le
courant de la journée devant le
juge d'instruction, qui l'a relaxé
après audition. Selon l'avocate
du suspect, aucun interprète
portugais n'a en effet pu être
trouvé pour traduire les propos
de son client et le juge
d'instruction a donc décidé de
relaxer le suspect.

La loi belge prévoit en effet que
la privation de liberté d'un
suspect pris en flagrant délit ne
peut excéder 24 heures, délai
durant lequel doit être mené, à
peine de nullité, l'interrogatoire
préalable à la délivrance
éventuelle d'un mandat d'arrêt
par le juge d'instruction. Cet
interrogatoire a donc tourné
court, faute d'interprète.

L'incident, largement commenté,
suscite l'indignation ou le rire,
c'est selon... mais il nous
rappelle une fois de plus que
notre monde a un problème
linguistique.

Nous dépensons une fortune
pour enseigner les langues à
nos enfants dans le cadre de
leurs études obligatoires.
Comme cela ne fonctionne pas
(ou pas bien), nous devons
également leur payer des
formations complémentaires
(leçons particulières, année
supplémentaire à l'étranger,
cours payants pour adultes,...).

Et comme ce n'est toujours pas
suffisant, il faut encore former
des traducteurs et interprètes et
payer ensuite (parfois gras-
sement) leurs prestations.

Et en fin de compte, le problème
n'est toujours pas résolu car s'il
est relativement facile de trouver
des interprètes anglais-français,
il est évidemment beaucoup plus
difficile d'obtenir des interpré-
tations telles que néerlandais-
danois, russe-mandarin, et
même... portugais-français,
apprenons-nous.

Rappelons encore que l'erreur
est humaine et que le passage
par un interprète peut toujours
poser des problèmes : l'expres-
sion "Traduttore, traditore"
[Traducteur, traître], exprime
parfaitement l'idée qu'il n'y a pas
de traduction parfaite. Même (et
surtout !) les systèmes de
traduction automatique sont tout
sauf infaillibles !

La conclusion s'impose : chacun
doit pouvoir se faire comprendre
par l'autre sans intermédiaire.
L'usage d'une langue commune
à toute l'humanité s'impose donc
(chacun prenant alors la
responsabilité de sa traduction).

Le choix de l'une quelconque de
nos langues nationales est
source d'injustice (que font les
jeunes anglais pendant que nos
enfants apprennent l'anglais ?)
et de conflits. Seule une langue
«neutre» (et aussi facile à
apprendre que possible) peut
faire l'affaire...

Bonne année !

...avec l'espéranto.